ZESZYTY NAUKOWE WYŻSZEJ SZKOŁY PEDAGOGICZNEJ
W BYDGOSZCZY
Studia Pedagogiczne z. 20

**IWONA STRACHANOWSKA**
WSP w Bydgoszczy

# ESPERANTA INSTRUADO

## 1. Skizo de ĝenerala didaktiko

La didaktiko estas tiu parto de la pedagogio/scienco pri edukado/, kiu pritraktas la arton de klerigade kaj instruado. Oni dividas ĝin en la ĝeneralan kaj specjalan didaktikon/metodikon/. La unuan koncernas la instruadon, ne konsiderante la specon de la lernejo kaj la instruobjekton, la duan limigas sin al la instruado de la unuopaj instruobjektoj.
La generala didaktiko donas nur komunajn konojn, direktojn, regulojn kaj instrukciojn. Ĝia ĉefa tasko estas pensigi, orientadi kaj instigi la instruiston, kiun klopodas bone kunigi la didaktikan teorion kun la instrusperton.
La celo de iu ajn klerigado estas la instruiteco kaj edukiteco, t.e. in enhava riĉeco de nia animo. Ni atingas ĝin per intenca klerigado en diversaj formoj de instruado, instrukcio kaj memlernado.
La instruiteco povas estis ĝenerala aŭ populara, atingebla per la elementa aŭ duagrada edukado; scienca kaj faka.

1.1. La instrumetodoj

La instruprocedo aŭ la interna organizado de la instruado havas jenajn erojn: la instrumetodon, la instruformon kaj la instruteknikon.

"Metodo estas sistema, pripensita, taŭga procedaro, kunigo kaj kombino de elektitaj rimedoj, procedoj, teknikoj por, kiel plej bone stingi konkretan, difinitan celon.

Nuntempe ekzistas opinioj, ke estas nur du veraj metodoj: tradukgramatika kaj senpera"[1] kaj ĉiuj aliaj estas kombinaĵoj de principoj kaj procedoj de ĉiuj aliaj estas kombinaĵoj de principoj kaj procedoj de tiuj du metodoj." La instrumetodo estas la plej grava elemento, kiun oni ne povas kopii, ĉar ĝi estas la rezoluto de pripensado pri la lernobjekto kaj la lernanto".[2]

"Tekniko, kiel nocio en la glottodidaktiko, estas subordigita al la metodo, kiel parto de ĝi, kaj estas aro da rimedoj. Do, la nocia m e t o d o estas pli ampleksa ol la nocia tekniko.
La metodo baziĝas sur procedoj, teknikoj kaj rimedoj".[3]
Metodo dependas de la:

– celoj/kion oni volas atingi per instruado, praktike kaj eduke,

– studobjekto /ĝia karaktero/,

– konsisto de gelernantoj/gepatra lingvo, ĝeneralaj antaŭkonoj, lingvaj antaŭkonoj de gelernantoj/,

– koncepto pri la vojo al la celo, tio estas la principoj/elektode rimedoj, procedoj, teknikoj kaj formoj de instruado/,

– la gepatra lingvo/interferenco kaj pozitivaj transferoj/,

– konkreta situacio,

– ĝeneralaj lingvaj antaŭkonoj.

Mi pensas, ke ne ekzistas absoluta metodo, valida ĉie kaj ĉiam kaj por ĉiu. Oni elektas koncepton kaj taŭgajn rimedojn, procedojn, teknikojn depende de supre menciitaj faktoroj.

La instruformo estas ligita al la metodo kaj de ĝi dependas, ĉu la instruado estats vigla, ĉu ĝi okazas aŭ kun la tuta klaso aŭ kun grupoj aŭ kun unuopuloj. Do, la formoj de instruado povas esti diversaj, ekzemple;

– lerneja/deviga aŭ nedeviga ekz. kromprograma kaj libera/,

– dum kursoj devigaj aŭ liberaj; tagaj, vesperaj, semajnfinaj, dumferiaj kaj aliaj.

1.2. Formoj de la instruprocezo

Por ke la instruhoro estu dinamika, estas necesaj eksteraj formoj, en kiuj disvolviĝas la instruprocezo. Oni devas ilin uzi altlerne ĉar nur tiel estas atingebla la plej bona rezulto.
Plej multe uzata estas la frunta instruado - nomata en didaktiko[4] liginta instruado - en kiu la lernantoj montras al la instruisto la fruton. Ĝi ebligas ordigitan kaj sisteman iradon de la instrulaboro.
La instruisto havas elstaran pozicion, sed ĝuste tio estas ofte baro de pli individua instruado.[5]
La fruntan instruadon oni povas variigi tiel, ke transprenas la eksteran gvidadon la klaso mem. Ĝi organizas surbaze de starigita instrucelo laboron, ĉe kiu la instruisto havas nur la funkcion de konsilanto/libere ligita instruado/.
La lernantoj sentas sin nun liberigitajn kaj fariĝas pro tio pli aktivaj, kio tamen ne devas transiri al anarkio.[6]
Ĉi tiu formo de E-instruado estas taŭga ĉe objektoj, kiuj permesas liberan diskutadon, provadon kaj uzadon, do ankaŭ ĉe konversacio.

La instrudo en s e k c i o j okazas kutime en malalte organizitaj lernejoj. Se sperta instruisto gvidas la instruadon en unuklasa elementa lernejo, li povas la malavantaĝojn de tiaspeca samtempa instruado en pluraj sekcioj per bona gvidado tiel influi, ke li stingas sufiĉe bonajn sukcesojn.[7]

Koncentrado de la instruado, alterno en la instruprogramo, efika nerekta okupo, uzo de helpantoj el la vico de plej aĝaj lernantoj estas kelkaj rimedoj, kiuj bone influas la nivelon de tiaspeca instruado.

Alia estas lia g r u p a instrudo en normala klaso, moderna, sed ankoraŭ ne tute provita formo de instruado. La didaktiko eluzas la socian instrinkton de dekjaruloj, kiuj volonte obeas sian gvidanton kun plena respendeco. Por ĉiun grupon respondencas ĉiujn anojn, ĉiu grupo kontribuas al la starigita celo de la tuta klaso. La grupojn povas solvi la saman taskon (konkuradon), aŭ ĉiun grupon plenumas apartan problemon. La organizo de la grupoj estas aŭ daŭra (por regula laboro), aŭ provizora/ ekskursoj, kolektado, observado ktp./. La nombro de la anoj estu kvar, plej multe kvin. La grupojn laboras laŭ regularon kaj havas gvidanton. La grupan instruadon taŭgas nur por tiuj temoj, kie estas eble partigi la laboro. La instruisto preparas la laborasignojn sur kartonojn en klaran kaj mallongan formon, iras de grupo al grupo konsilas, helpas kaj kuraĝigas.
Por la instruisto mem la grupa instruado estas, tre postulema. Necesa estas ĉiama studado de la faka literaturo. La klasa individuala instruado estu ĉi tie nur

menciita.

La instruistoj de lingvo Esperanto devas koni almenaŭ en ĉefaj trajtoj la historian evoluon de la metodiko pri instruado de fremdaj lingvoj, se li volas laŭ modernaj principoj konscie direkti la propran metodon.

## BIBLIOGRAFIO


1

F. Grucza i L. Zabłocki (red.): Polska myśl glottodydaktyczna. Warszawa PWN 1979
Kybernetische Modelle der sprachlichen, Kommunikation. Wrocław-Warszawa-Kraków 1975 (tł. I.S.)

2

W. Okoń: Wprowadzenie do dydaktyki ogólnej. Warszawa PWN 1987 (tł. I. S.)

3

W. Okoń: (red.): Słownik pedagogiczny. Warszawa PWN 1984 (tł. I.S.)

4

Cz. Kupisiewicz: Podstawy dydaktyki ogólnej. Warszawa PWN 1984 (tł. I.S.)

5

D. Blanke (red.): Esperanto: lingvo-movado-instruado. Berlin 1977

6

Zs. Barcsay (red.): Metodiko en la praktiko. E-Centro-Padeborn 1982

7

W. Marton: Optymalizacja nauczania języka obcego w szkole. Warszawa PZWS 1979 (tł. I.S.)